

KATOLIKA SENTO

7



12

rm

U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 51° - 1972

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

51a jaro

n° 7

Julio 1972

FERIOJ KAJ PREĜO

(Antaŭ ol reciti la Anĝeluson kun la fideluloj kunvenintaj en Placo Sankta Petro, dimanĉon, la 15-an de junio, la papo jene alparolis ilin):

"Komenciĝas la somero, komenciĝas la periodo de la ferioj. Al ĉiuj ni deziras ilin bonaj kaj serenaj, vere ripozigaj kaj refortigaj. Kaj ne nur por la fortoj fizikaj, sed ankaŭ por tiuj de la spirito. Se efektive la ferioj malintensigas la ordinarajn okupojn kaj igas disponebla iom el nia tempo por zorgi pri ni mem, ni memoru pri Dio, tio estas doni al la religia praktiko kelkan momenton de pli atentema aliĝo. La partopreno en la festa meso, ekzemple, estu fine ĝuata kiel nia ĉefa konsolo, al kiu ni rezervos horon da spirita pleneco. La Eklezio faras al ni kutiman devon pri ĝi, ĉar por nia religia vivo estas devo kaj bezono ĉi tiu ripetiĝanta observado: la kulto al Dio devas ĉefi en nia konceptado pri la vivo; la semajna rememoro pri la paska mistero, de kiu dependas nia savo, devas reviviĝi en la "tago de la Sinjoro"; kaj la renkontiĝo kun la asembleo de la Eklezio preĝanta devas memorigi al ni akurate kaj socie, ke ni estas Popolo de Dio.

Estos vere bele, se ni profitos de la somera malstreĉiĝo por fortigi nian aŭtentikan religian senton per kelkaj personaj agoj internaj kaj eksteraj de konfirma

kredo; kaj se ni kapablos fari el kontakto kun la naturo - maro, kamparo aŭ montaro - piedestalon por pli bona kontakto kun Dio. Ankaŭ la senlabora tempo de la ferioj estas tempo valora.

Krome, kiel forgesi ankaŭ dum ĉi tiu periodo la homajn dramojn, kiuj nin ĉirkaŭas? la bezonojn de la malriĉuloj, la suferojn de la malsanuloj, la sociajn krizojn, la moralajn mizerojn, la konfliktojn inter la popoloj?

La Sankta Virgulino, kiu, kiel diras la Evangelio, iris facilpaŝe sur la montoj por viziti Elizabetan, sian parencinon, kaj tie kantis profete "Magnificat", estas por ni, ankaŭ sub ĉi tiu aspekto, gvidanto kaj ekzemplo.

trad. L. M.

PRI KARITATO

En "L'Osservatore Romano" de la 1-a de junio 1972-a, Ezio Franceschini, profesoro pri "Historio de latina mezepoka literaturo" ĉe la Katolika Universitato en Milano, aperigis la kompletan originalan tekston de antikva eŭkaristia himno. En la enkonduka artikolo, li interalie diras: "Ĝi estas himno belega, pri kiu akordas la juĝo de la plej severaj kritikistoj" "Ke ĝi estas antikva diris la kodeksoj ĝin konservantaj: du de la 9-a jarc." ... "kaj du de la 10-a" ... "Al kiuj aldoniĝas unu posta, de la 15-a jarc., de Oksfordo, en kiu la teksto ricevis humanismajn modifetojn; unu el ili, ĝuste en la refreno, jam eniris la tradicion kaj akiris tiom da favoro, ke ĝi ne plu malaperos: 'Ubi caritas est vera, Deus ibi est' diras akorde la aŭtentika tradicio: 'Ubi caritas et amor, Deus ibi est' korektis la nekonata reviziinto de la Oksforda redaktaĵo, ne rimarkante, ke 'caritas' kaj 'amor' estas absolute la sama afero, aŭ pensante, ke 'caritas et amor' sonas pli bone kaj pli bo

ne adaptiĝas al la kanto." ... "La aŭtoro de la himno estis nekonata ĝis 1954-a" ... "Tiu anonimeco falis fare de Dag Norberg, la sveda fakulo, al kiu tiom ŝuldas la studoj pri mezepoka latineco" ... "Li pruvis, ke la himno estis verkita de Sankta Paolino el Aquileja (ne malpli fama kiel teologo ol kiel poeto, mortinta en 802-a) kaj kantita ĉe la sinodo en Cividale en 796-a." ... "Ni donas nun ĉi tie la tekston de la himno en latina lingvo, kaj ĉar ĝi estas la originala teksto, kaj pro la internacia karaktero de 'L'Osservatore Romano': tiel ke, se estas iu nacia lingvo, al kiu ĝi ankoraŭ ne estis tradukita, oni tion faru laŭ bazo certa."

Kvankam Ezio Franceschini parolas nur pri "lingvo nacia", sur baze de tiu aŭtentika originala teksto ni donas la fidelan ritman tradukon en Esperanto, por ke povu ĝui tiun belan himnon ankaŭ tiuj gesamideanoj, en ki es nacia lingvo ne ekzistas ankoraŭ traduko.

PRI KARITATO

1 Nin kuniĝis ĉiujn strikte - Kristo-amo:

Ni jubilu kaj en Kristo - estu gajaj,

Ni respektu kaj ni amu - Dion vivan

Kaj per koro tre sincera - ni nin amu.

Kie karitato vera - tie estas Dio.

- 2 Al la hom' sen karitato - mankas ĉio,
 Kaj li restas en tenebro - de la morto.
 Reciproke ni nin amu, - kaj en tago,
 Laŭkonvene, ni paŝadu, - lumo-filoj.

Kie karitato vera - tie estas Dio.

- 3 La Sinjoro krie diras - klaravoĉe:
 "Ĉiufoje, kiam ie - kune estos
 Tri aŭ du, pro mia nomo - kuniĝintaj,
 Mi mem ankaŭ estos tie - inter ili."

Kie karitato vera - tie estas Dio.

- 4 Kiam do ni kune formos - unu korpon,
 Ni klopodu ne disiĝi - laŭ l'animo.
 Ĉesu fine malbonagoj - kaj kvereloj.
 Inter ni troviĝos tiel - vere Kristo.

Kie karitato vera - tie estas Dio.

- 5 Ĉar, se karitat' kunigas - forestantojn,
 Malkonkordo eĉ disigas - ĉeestantojn.
 Ni nin sentu tre ligitaj - ĉiuj kune,
 Por ke ni el la kuneco - ne disiĝu.

Kie karitato vera - tie estas Dio.

- 6 Karitat' ja estas bono, - granda dono,
 El ĝi venas l' ordo tuta - de l' preskriboj
 Kaj plenum' de l' nova leĝo - kaj antikva;
 Ĝi Ĉielen sendas homojn - de ĝi plenajn.
 Kie karitato vera - tie estas Dio.
- 7 Karitaton reprezentas - ruĝa ŝtofo
 De l' praleĝo, duan fojon - tinkturenda,
 Ĉar konsiston ĝian formas - du preskriboj,
 Por la amo al Sinjoro - kaj al homo.
 Kie karitato vera - tie estas Dio.
- 8 Do per tuta koro Dion - ni amegu,
 Al nenio ni postmetu - tiun amon.
 Kiel nin en Li ni amu - proksimulojn
 Kaj pro Kristo ankaŭ same - malamikojn.
 Kie karitato vera - tie estas Dio.
- 9 Kiu de la karitato - la preskribojn
 Per humila menso celas - observadi,
 Vere li en Kristo restas, - kaj en tiu,
 Forpelinte krimo-nokton, - restas Kristo.
 Kia karitato vera - tie estas Dio.

10 Vojo kruta kaj mallarĝa - portas alten,
 Larĝa estas kaj dekliva - la descenda;
 Sed eternan vivon donas - frata amo
 Kaj senfine daŭran punon - la kvereloj.
 Kie karitato vera - tie estas Dio.


11 Petu ni unuanime - Plejaltulon,
 Ke li milda donu pacon - al la tagoj,
 Krom esper' kaj kredo notu - la bonfarojn,
 Por ke gajnu ni l' kuneston - de l' savitoj.
 Kie karitato vera - tie estas Dio.

12 "Gloro al l' eterna reĝo" - ni kantadu
 Kaj ni preĝu por la vivo - de l' sinjoroj,
 Por ke ĝoju multajn jarojn - ni kun ili,
 Kies amo nin ĉi tie - unuigas.
 Kie karitato vera - tie estas Dio.

trad. Luigi Minnaja

=====

60-JARA JUBILEO DE LA BOLOGNA Esperanto-Grupo.
 La Italaj Katolikaj Esperantistoj anoj de U.E.C.I. grupi
 ĝis en Bologna, por sia jarkunveno, kune kun pli ol 200
 esperantistoj, inter kiuj multaj fervojistoj, okaze de la
 celebrego de la 60a datreveno de la loka E.-Grupo "Achil
 le Tellini". La programo de la interesa aranĝo antaŭvi
 dis por la unua tago interkonan renkontiĝon en la kluba



sidejo, kie oni povas admiri riĉenhavan fotografian ek
 spozicion, kiu substrekas la vivon de la grupo ekde la
 fondiĝo, kaj ricevi elegantan paperujon kun esperantlin
 gva broŝuro pri la historio de la Bologna E.-Grupo. La

duan tagon, post esperantlingva sankta meso celebrita en la preĝejo "Santa Maria della Pioggia", okazis oficiala inaŭguro de la kunveno en la belega sidejo de la komunuma biblioteko en "Palazzo Montanari", kun la ĉeesto de la provinca studento. Dum tiu ceremonio oni, interalie, donacis memormedalon al la filino de la fondinto de la Grupo, Achille Tellini; aliajn medalojn oni donacis al personoj, kiuj havas apartajn meritojn koncerne la grupon. Poste en la grandiozaj salonoj de la Komunuma Arta Kolekto en la Urbodomo, la skabenopri Kulturaj Aferoj, Prof. Giorgio Ghezzi, akceptis la multnombrajn esperantistojn, kaj abunde regalis ilin. Post komuna tagmanĝo okazis lotumado kun belegaj premioj, kaj kunveno de la estraro de la Itala Fervojista E.-Asocio. Finis la posttagmezon interesa vizito de la urbo kun esperantlingva ĉiĉerono. Dume la katolikoj renkontiĝis por sia jarkunveno sub la prezido de p. Ciccanti; kaj poste, grupe ili iris al Bologna tombejo por deponi omaĝe bukedon da floroj sur la tombo de la esperanta pioniro p. prof. Modesto Carolfi. La tago finiĝis per prezentado de filmoj en Esperanto de la itala aŭtomobilfabriko FIAT, kaj tombolo. (Nia foto montras la UECI-prezidanton p. A. Ciccanti, diservanta en la preĝejo "S. Maria della Pioggia").

(El raporto de G. Gimelli)

ALIĜIS AL UECI-CECR: Romo: G. Barbalace; Voghera (PV): C. Carena; Germanujo: C. Rabe. Entute: 414.

De nun la novaj abonantoj ricevos, krom la n-ojn aperontajn en ĉi tiu jaro, ankaŭ ĉiujn de la 1973-a.

ABONKOTIZO: It. £.: 1.000 (=Us.dol. 1,60)

Poŝtĝirkonto 3-7791 al D-ro C.C. Ferrari

aŭ 1-37638 al P. Giacinto Jacobitti

.....

POR LA MOZAIKO honore al N.S. de la Espero en Nazareto:

N. Pagliari (Bari)	£. 5.000
C. Canu (Romo)	10.000
L. Terrazzani (VR)	10.000
G. Barbalace (Romo)	5.000

Ĝis nun entute £. 231.489.

Kun plezuro ni komunikas, ke pro interesiĝo de iu nia roma s-ano, ni povas premii tiujn, kiuj donacos almenaŭ 1.500 lirojn, per serio de tiu filatela eldono de la Vatikana poŝtentrepreno, pri Venecio, kiu dum malmultaj tagoj elĉerpiĝis kaj fariĝis jam altvalora. Ĉar la kvanto de tiuj serioj estas malgranda, rapidu sendi vian monoferon! Validas ankoraŭ por ĉiuj, kiuj donacos 10.000 lirojn, la alia premio pri bildkarto de N.S. de la Espero kun Vatikana poŝtmarko, afrankita la saman tagon de ĝia inaŭguro kaj de la papa beno.

ROMA ESPERANTA VOĈO
nº107

ESPERANT-LINGVA GEEDZIĜO EN ROMO. Tute escepta evento okazis en Romo la 8an de julio, je tagmezo kaj duono, en la historia baziliko titolita honore al la sanktuloj Kosmo kaj Damjano: Gianfranco Barbalace, estrarano de la roma esperanto-grupo, kaj Lucia Giurelli, juna esperantistino, sakramente geedziĝis per esperantlingva ceremonio dum diservo celebrita de patro Jacobitti. Verdire ne temis pri la unua esperantlingva geedziĝo en la mondo, kaj eĉ ne en Romo; fakte, krom aliaj okazintaj en aliaj landoj, jam en Romo mem



havis lokon esperantlingva geedziĝo, antaŭ kelkaj jaroj, nome tiu de Pasquale Puracchio, italo, kaj lia edzino Elizabeta, hungarino. Sed intence ni substrekiĝis, ke tiam Pasquale Puracchio iusence edziĝis ... al sia propra edzino, ĉar ili jam estis geedzoj laŭ civila leĝo, en Hungarujo, kaj simple ripetis la ceremonion, ĉi foje en Esperanto, per religia rito. Ni povas diri do, ke la nuna geedziĝo de Gianfranco Barbalace kaj Lucia

Giurelli estis efektive la unua kompleta geedziĝo tute en Esperanto, kiu okazis en Romo. Krome, ĝi ankaŭ estis la unua publika geedziĝo en Esperanto ĉi tie en Romo, ĉar la antaŭa ceremonio de gesinjoroj Puracchio okazis duone publike, tio estas en la kriptoj de la preĝejo honore al Kristo Reĝo, kie tiutempe la romaj esperantistoj ĉeestis la esperantlingvan meson. Ĉi-foje, kontraŭe, ne nur la esperantlingva geedziĝo estis publika, sed eĉ oni klopodis diskonigi kiel plej eble la aferon, per multnombraj antaŭanoncoj al la ĵurnaloj kaj invitoj al ĵurnalistoj, filmistoj, kaj tiel plu. Sekve de tiu intensa agado, fakte pluraj ĵurnalistoj kaj filmistoj ĉeestis la ceremonion, kiu estis ankaŭ anoncita grandreliefe en la plej disvastigita el la romaj ĵurnaloj, nome "Il tempo", jam la tagon antaŭ tiu de la geedziĝo. La katolika ĵurnalo "Avvenire" publikis grandan foton. Same alia ĵurnalo, konsiderinde disvastigita, nome "Il giornale d'Italia", la tagon mem de la geedziĝo publikis la foton de la geedzoj kun akompana klarigo, kaj la postan tagon ĝi eĉ prezentis dukolumnan artikolon pri la ceremonio, kun citado de la ĉefaj partoj de la esperantlingva rito, kaj menciado de la celoj kaj perspektivoj de la esperantistoj, aparte de tiuj katolikaj. Ankaŭ pluraj eksterlandaj ĵurnaloj raportis pri tiu evento. La semajna revuo "Lo specchio" kaj la prestiĝa semajna revuo "Panorama", ankaŭ sendis ĵurnalistojn, kaj promesis aperigon de artikoloj. Senditoj de filmentrepreno filmis la ceremonion, kaj prezentos partojn el ĝi el la kinejoj. Entute oni povas diri, ke la evento havis konsiderindan eŭron. Apartigante la sintenon de pluraj ĵurnalistoj, kiuj vidinte en la ĵurnaloj mencion de la geedziĝo, demandas "kia" estas la esperanta liturgio..., apartigante do, ke pluraj personoj iris al la geedziĝo kun la opinio (kaj kelkfoje eble eĉ espero) trovi ekzemplon de kontestado de la katolikaj kutimoj, dum oni povis konstati, ke te-

mis pri tute akceptita kaj laŭleĝa afero, krom tio, ni di ras - alia detalo multe tiklis la interesiĝon de la homoj, nome, ke ambaŭ geedzoj estas italaj, kaj ital-parolantoj. Kial do, oni sin demandis, uzi internacian lingvon ĝuste por ago tiel grava kaj intima kiel geedziĝo? Al tiu demando respondis la geedzoj: "ĉar ni kredas en la ho mo, en la paco, en la amikeco kaj interkompreno, kaj tiujn kvalitojn ni intencas emfazi ĝuste en ĉi tiu eksterordinara tago, kiam surbaze de amo kaj interkompreno ni starigas novan familion". P. Jacobitti, adresante si ajn vortojn al la gefianĉoj tuj antaŭ la geedza rito, reliefigis ankaŭ alian motivon. "Alvokante ĉirkaŭ vin - li diris - karulojn kaj konatojn, vi intencis proklami antaŭ la ĉielo kaj la tero vian absolutan fidelecon. Tio akiras notindan signifon en ĉi tiu nia epoko, kiam oni klo podas multloke, kaj ankaŭ ĉe ni, por la familia disiĝo kaj la facila rompo de la geedza kontrakto. Sed, plenu mante per la esperanta lingvo vian riton, vi volis kelkmaniere doni al via promeso la plej eble vastan dimension. La tuta mondo estos ek de nun atestanto ke, kiel vi nun reciproke amas vin, vi firme intencas konservi fidelecon por ĉiam al via amo".

Pri alia esperantlingva edziĝo informas nin Karl Mascha el Vieno. Temis pri Reiko Yano el Amamatsu, Japanujo kaj Ernesto Quietensky el Gloggnitz, Aŭstrujo. La fianĉino ne scipovis la germanan lingvon kaj la germano ne konis la japanan; sed ambaŭ parolis la edziĝdeklaron en sia gepatra lingvo kaj en la komuna, Esperanto. Multaj esperantistoj kaj ne esperantistoj partoprenis en la edziĝfestoj. Tio okazis la 9an de Junio. Celebris la edziĝan ceremonion p. Bruno Hebenstreit.

Ankaŭ en Verona geedziĝis esperantlingve Uber Soardo kaj Mirella Garbosa, la 10an de julio. Celebris sac. F. Ruaro, redaktoro de Espero Katolika.

 El la Katolika Eklezio

RICEVANTE LA SANKTAN KOLEGARON de kardinaloj, okaze de sia nomfesto, la papo respondis al la omagaj vortoj de la dekanano, kard. Amleto Cicognani. Laŭ la kutimo de tiu okazaĵo, la papo donis panoraman rigardon pri la ĝeneralaj kondiĉoj de la eklezio interne kaj ekstere de ĝi, substrekante kelkajn aspektojn, kiuj meritas apartan atenton. "La papo - li diris - spertas, meze de la plej gravaj malfacilaĵoj, la ĉeeston de Kristo, kiu plenumas sian promeson, asistante sian eklezion kaj aparte sian vikarion. Tio donas al li la necesan forton, la esperon, la konfidon, por ke li rezistu en sia gravega tasko. Ĝuste tiu espero kaj konfido - konstatis la papo - mankas hodiaŭ ĉe multaj. Kelkaj, fakte, skuitaj de kritikismo, kiu vastiĝis dum ĉi tiuj lastaj jaroj, opinias, ke la eklezia konstruaĵo pro siaj reformoj hodiaŭ estas pli ol iam en danĝero de pereado. Laŭ aliaj, male, ĝiaj institucioj ne plu taŭgas, ĝiaj instruoj ne estas laŭ nia tempo, la eklezio devus konformiĝi al la progresoj de la socio kaj de la scienco. Tiel ili opinias, ke eĉ la Konkilio rajtigas rompon kun la tradicio, ke la antaŭaj konstitucioj, doktrinoj, dogmoj, moroj, juro, devas esti funde renovigataj. Kelkaj eĉ predikas neceson de perforto por la "liberigo" de ĉiuj iamaj bremsoj. Tiu falsa interpreto de la konkilio ŝajnas celi ĉe tiuj, neniigon de la eklezia instruarajto; miskomprenas plurismon, deklarante, ke ĉi tio rajtigas liberan interpretadon de doktrinoj kaj kunekziston eĉ de kontraŭaj konceptoj; el precize difinitaj rajtoj ĝi celas transsalti al senlimaj rajtoj kaj kompleta aŭtonomio, al lokaj eklezioj sendependaj, ne zorgantaj pri la doktrinoj konfirmitaj per la papaj kaj la konciliaj dokumentoj. El tio de

venas danĝeraj sekvoj, konfuzo en la konsciencoj, religia malriĉiĝo, dolorigaj forlasadoj de konsekrita vivo, de geedza ligilo; malforteco de ekumenismo, nesufiĉo de moralaj baroj kontraŭ la inundanta plezurcelado. Bedaŭrinde ĉi tiuj ne estas la solaj suferoj, kiuj dolorigas la eklezion. Ĉar oni ne povas forgesi la malfacilaĵojn eĉ interne de la misio de la eklezio. Ĝi devas anonci ne nur veron kaj justecon, sed ankaŭ malaprobi, denunci, kondamni la krimojn kontraŭ justeco kaj vero. La eklezio, kiel "morala konscienco de la homaro" aŭskultas la alvokojn, kiuj el ĉiu flanko leviĝas al ĝi; sed kiel malfacile estas trovi objektecon inter tiom da interesitaj voĉoj, kaj kiom da prudento necesas por eviti ofendojn de la kontraŭa parto, kiuj povas okazigi la plej danĝerajn reagojn! La papo menciis ĉi tie, ke, kvankam ekzistas pluraj signoj, kiuj donas esperon de justeco en la mondo: altegnivelaj kontaktoj inter Usono kun Ĉinio kaj kun Sovetunio, akordoj kun la Federacia Germanujo, Pollando kaj Sovetunio, ktp., tamen ankoraŭ daŭras en landoj de ekstrema kaj meza oriento, en Eŭropo mem, kaj en kelkaj afrikaj nacioj, teruraj sangelferŝaj konfliktoj! La papo tamen esperas kaj alvokas ĉiujn al fido en la promesita helpo de Dio, en la diaj karismoj, en la trezoro de la vero, kiun Jesuo lasis al sia eklezio por lumigi la mondon. Kiom da kristanoj ankoraŭ travivas intensan preĝadon kaj unuiĝon kun Dio! Kiom da larĝanimaj kredantoj celas pli evangelian vivon per kontemplado kaj fratamo! Kiom da sacerdotoj, gereliguloj, apostolaj laikoj donas sian ateston al la Sinjoro per sia abnegacio kaj fideleco, kio estas sendube frukto de la Sankta Spirito! Sopiro de justeco en la mondo agitas tre multajn animojn, precipe inter junuloj kaj stimulas ilin sin dediĉi por helpi kuraĝe kaj malavare al leviĝo kaj progreso de la popoloj, al la spirita kaj materia zorgo por la fratoj. Pli alta spirito de malriĉeco, laŭ la ek-

zemplo de Kristo kaj de la apostola eklezio, hodiaŭ montriĝas el la eklezia konscienco; pli vasta malfermiĝo al la pozitivaj valoroj de la mondo, oportune kuraĝigita per la koncilia konstitucio "Gaudium et spes" donas al la eklezio pretecon al ĉiuj problemoj pri la socia, kultura kaj spirita vivo de la homaro. Kaj konsola estas la spektaklo, kiun donas la aktiveco de la tutmonda episkoparo per siaj konferencoj, organizado de karitato, iniciatoj por katekezo, por la misioj, ktp. La sinodo de la pasinta jaro estis la plej trafa atesto de ĉi tiu kunlaboro en la solvo de delikataj kaj urĝaj problemoj internaj, kiel la sacerdotea vivo, kaj eksteraj, kiel justeco en la mondo. La Sankta Spirito, per la ekumena koncilio montris al ĉiuj la novajn vojojn por nuntempigi la eklezion, por ke ĝi marŝu antaŭ la homaro laŭ la vojo de la savo: ne temas pri detruo de la pasinteco, pri kontestado, sed pri alvoko de ĉiuj fortoj por konstrui en unueco, kredo, kulto, karitato, obeemo, kunlaborado.

POST LA FREŜDATA INSTRUKCIO de la Sekretariato por la unuiĝo de la kristanoj, publikita la 1an de junio 1972, mons. Jozefo Marafini donis pri tio kelkajn klarigojn. Ĉar de nun apartenas al la episkopoj ekzameni la kazojn en kiuj oni povas aŭ male akcepti disigitan fraton en la eŭkaristian komunion, li klarigis, ke fundamenta kondiĉo estas, ke la petanto esprimu la saman kredon je la reala ĉeesto de Kristo kaj je la esenca sanktofero de la meso, tiel same kiel la katolika eklezio kredas kaj konfesas. Ne estas necese do, ke tia estu la kredo oficiala de la eklezio, al kiu la petanto apartenas, sed nur, ke estu lia persona kredo. Kiam temas pri la ortodoksa eklezio kun identa kredo, kaj verŝajne - li aldonis - pri la anglikana, tiu kondiĉo estas supozata. Ĉiukaze apartenas al la episkopo kalkuli ĉiun cirkonstancon. La diritaj kondiĉoj ne ŝajnas ekzisti en la

ekumenaj renkontiĝoj pro ilia laŭokaza karaktero, ankaŭ pro tio ke, unuiĝo en la kredo tiuokaze ekzistas ne fakte sed nur en la espero.

GRAVA FUNEBRO POR la ekumena movado kaj por ĉiuj kristanoj estis la forpaso de Atenagoro, la spirita 86-jara gvidanto de la ortodoksa eklezio, (250 milio - noj da kredantoj, kiu mortis la 7an de julio en Istambulo. Ne longe antaŭ sia morto, je la 21a de marto 1971, li ankoraŭ skribis al la Papo: "Jam preta en la vespermanĝejo estas la tablo, kaj nia Sinjoro deziras manĝi kun ni la Paskon. Ĉu ni malkonsentos? Restas, ja kelkaj obstakloj, kiuj devenas de historia heredo kaj de aliaj kaŭzoj: la malamiko de la dia regno subtenas ilin. Sed ĉu ni ne fidis al tiu, kiu diris, ke tio, kio estas ne ebla al homoj, estas ebla al Dio?" La granda sopiro de la ekumena patriarko estis la rekunigo de ĉiuj kristanoj, aparte, katolikoj kaj ortodoksuloj, kaj li havis por Paŭlo VI la plej grandan estimon, kiel al la unua gvidanto de la kristana eklezio. Kiel ĉiu profeto, li ankoraŭ renkontis opoziciojn ekstere kaj eĉ interne de la eklezio; sed la historio certe pravigos lin. La papo, kiu havis ĉiam en la pli alta honoro la majestatan figuron de patriarko Atenagoro, sendis delegacion de la Sankta Sidejo, sub la gvido de kard. Willebrands, por partopreni je la 11a de julio en la funebraj ceremonioj. Kaj la 9an de julio, adresante la kutiman dimanĉan benon el sia fenestro al la pilgrimantaro kunigita en placo Sankta Petro, la papo ne preterlasis la okazon memori la forpasintan Patriarkon. "Nia hodiaŭa temo - li diris - rilatas Lian Moŝtan Sanktecon, la Grek-Ortodoksan Patriarkon Atenagoro. La tuta mondo, parolas pri li kun la admiro kaj la estimo, kiun oni adresas al tiuj eminentaj homoj, kiuj personigas ideon ampleksantan la destinojn de la historio kaj celantan in

terpreti la dian volon. Atenagoro: eĉ el lia aspekto majesta kaj hieratika travidiĝis lia interna sankteco, kaj lia grava kaj simpla interparolado eĥis la simplan evangelian bonecon. Li inspiris respekton kaj simpatian. Niankaŭ estis inter la multaj, kiuj admiris kaj amis lin; kaj li havis al ni amikajn kaj fidemajn sentojn, kiuj ĉiam kortuŝis nin; lia rememoro nun kreskigas en ni la ĉagrenon pri li, kaj la esperon, ke ni havos lin frato por ĉiam en la ĉielo. Vi scias, kial ni rekomendas al via memoro kaj preĝado ĉi tiun grandan viron de eklezio respektiginda, sed ankoraŭ ne plene kunigita kun la katolika: ĉar li estis konstanta akcelanto kaj apostolo de la rekuniĝo de la Grek-Ortodoksa kaj Katolika eklezioj kaj de aliaj kristanaj eklezioj kaj kununumoj ankoraŭ ne integriĝintaj en la unikan mistikan korpon de Kristo. Trifoje ni havis la ĝojon renkontiĝi kun li kaj centfoje intersanĝi deziresprimojn kaj promesojn pri ĉia klopodo celanta restarigon inter ni de perfekta unueco en la kredo kaj en la amo de Kristo; kaj ĉiam li resumis siajn sentojn per nur unu kaj supera espero: "trinki el la sama kalikoj" kun ni, tio estas, celebri kune la eŭkaristian sanktan oferon, sintezo kaj krono de la komuna eklezia identeco kun Kristo. Ni ankaŭ tiom deziras la samon! Nun, ĉi tiu ne plenumita deziro devas esti lia heredo kaj nia celo. Pie memorante pri patriarko Atenagoro ni preĝu ke, per la propeto de Maria, patrino de Kristo kaj de lia eklezio, ĉi tiu deziro efektiviĝu.

LA PROFUNDA RESPEKTO de la katolika eklezio por la spiritalaj, moralaj kaj soci-kulturaj trezoroj de buddismo, estis konfirmata de Paŭlo VI al la ĝenerala patriarko, komisiita de la tajlanda buddismo, Somdey Phra Vannarat, aŭdienco akceptita kune kun du membroj de la tajlanda registaro kaj aliaj samlandaj

buddistoj. "En via lando la buddisma idealo - diris Paŭlo VI - klopodis serioze kaj diligente kompreni la plej profundajn misterojn, kiuj koncernas la homan ekziston. Ĉi tiuj misteroj malkvietigas la koron de la homo, kaj eĉ kiam li ne sukcesas precize klarigi ilin, ili tamen proponas demandojn, kies solvo rezultas pli valora ol ĉiu ajn progreso en la kono de malsupraj aferoj. La buddisma doktrino agnoskas, ke ĉi tiu ŝanĝiĝema mondo estas nepre nesufiĉa, por atingi la homajn idealojn, kaj klopodas pruvi, ke la homo povas sin liberigi de la sufero, sekvante vojon de profunda asketeco. Ni - konkludis la papo - agnoskas la valorojn, kiujn vi gardas, kaj aldonas al la viaj nian deziron, ke ili rezistu kaj kresku. Ni esperas, ke dialogo pli kaj pli amika kaj intima kunlaborado estu inter la tradicioj, kiujn vi reprezentas, kaj nia eklezio.

DE TALA EKZAMENO pri kunlaborado inter la katolika eklezio kaj la Ekumena Konsilio de Eklezioj (CEC) estis penumita en Romo de la komuna laborgrupo, kiu jam de ses jaroj funkciadas. Oni pridiskutis unue la temon pri aliĝo de la katolika eklezio al CEC, konstatante, ke kvankam la problemo estas profunde pristudata, ne estas realisme opinii, ke ĝi trovos respondon dum la proksima tempo. Tamen oni substrekis, ke esploradoj devas daŭri kaj kreski. La grupo raportis kaj diskutis pri samcelaj kunvenoj, kiuj laboras laŭ regiona aŭ nacia nivelo, pri komuna agado por asisto al subevoluintaj landoj, pri paco inter la nacioj, kaj pri kelkaj apartaj temoj, kiel familio, virino, junularo.

MEMORE DE LA 50a datreveno de la sacerdota ordino de Paŭlo VI, la administrantaro de la baziliko S. Petro dediĉis bronzan pordegon, skulptitan de Lello Scorzelli. La pordego, situanta ĉe la enirejo dirita:

"Sankta Marta" nomiĝas: "La pordo de la preĝo", kaj ilustras kvar ekleziajn preĝojn, nome: "Pater noster", "Benedictus", "Magnificat" kaj "Nunc dimittis".

LA RESTAŬRAJ LABOROJ de la "Pietà" de Miĥaelo Anĝelo. La kapelo, en kiu troviĝas la "Pietà" - marmora skulptaĵo de la Madono tenanta sur la genuoj la korpon de la mortinta Filo - estis fermita por la publiko lige kun la ekkomenco de la restaŭraj laboroj de ĉi tiu skulptaĵo, difektita de nepriresponda vandalo. La laboroj daŭros kelkajn monatojn. Tiucele estis vokita speciala komisiono, precize pririgardonta la difektaĵojn kaj 50 derompaĵojn. Oni informis la gazeton, ke krom gravaj difektoj de la mano de la Madono kaj la okulo, ankaŭ maldekstra ŝia vango estis difektita. Tamen la malpliigo estas neperceptebla. Prof. de Campos diris, ke la teknikaj laboraj restaŭroj ne prezentas tro grandajn malfacilaĵojn. Se temas pri tio, ĉu estos videblaj postsignoj de la kunmeto de l' rompaĵoj, hodiaŭ oni ankoraŭ nenion povas diri je tiu temo. La malhela makulo sur la okulo de la Madono devenas de la lako de la ŝtonista martelo, per kio sin priservis la kaŭzinto. (Fr. Walas - Pollando)

LA FESTKOMITATO HONORE al la Virgulino de Bonaria, (Cagliari-Sardinio), okaze de la sesa jarcento de ĝia apero, decidis memorigi la viziton de Paŭlo VI (24an de aprilo 1970a) al tiu sanktejo, per starigo de monumento al la papo. La bronza verko, tri metrojn alta, skulptita de Enriko Manfrini, estis inaŭgurita la 2an de julio en la portiko de la baziliko.

910 ESTAS LA MISIISTOJ kaj misiistinoj kiuj, devnantaj de Aŭstrujo, laboras en ĉiuj landoj, precipe en tiuj de la tria mondo: 231 sacerdotoj, 46 helpantaj fratoj kaj 633 fratinoj. La plej parto troviĝas en la La

tina Ameriko, precipe en Brazilo, Argentino kaj Boli-vio. Multaj estas ankaŭ en Afriko kaj Aŭstralio, kaj rimarkinda nombro en Novgvineo. La sacerdotoj labo-ras precipe en la paŝtista kampo, dum aliaj estas ins-truistoj en ĉiunivelaj lernejoj. Preskaŭ ĉiuj kooperan-taj fratoj zorgas pri metiaj aŭ agrikulturaj laboroj, kaj la fratinoj pri instruado, socia kaj porsaniga asisto. Iom maltrankviligas nur la meza aĝo de tiuj misiaj for-toj. Nur 4 el 10 fratinoj estas malpli ol 50 jara kaj 40 procentoj de tiuj, kiuj rezidas en misioj estas pli ol 60 jaraj. La meza aĝo de misiistoj estas 50 jara kaj kva-rono da ili estas pli ol 60 jara.

LA ĈEĤOSLOVAKA eklezio trairas unu el siaj plej mal-facilaj momentoj. Pligravigis tion la forpaso preskaŭ samtempa de du el ĝiaj episkopoj, tiel ke hodiaŭ ĝi es-tas sen sep gvidantoj de siaj diocezoj. Neniu episkopo restis en Moravio kaj Boemio. Vivas nur la episkopode Litomerice, Stefan Trochta, maljuna kaj malsana; la a-postola administranto de Prago, Frantisek Tomašek, 73-jara, kaj helpepiskopo Kajetan Matousek, kiu ta-men funkcias kiel kapelano-parokestro de Sankta Ad al-berto en Prago. En Ĉeĥoslovakio la katolikoj estas ĉir-kaŭ 11 milionoj el la 14 milionoj da loĝantoj, kaj la slo-vaka loĝantaro estas preskaŭ entute katolika.

LA FRANCA DOMINIKA pastro, p. Raimondo Pichard, kiu de tridek jaroj direktas en la aŭdo-vida kampo re-ligiajn transsendojn, vizitante Romon estis intervjui-ta pri sia laboro. Lia celo - li deklaris - estas kontak-ti kun la aganta komitato de U.N.D.A., la internacia organizo kiu kunordigas la entreprenojn de sociaj ko-munikiloj en la katolika kampo. Eĉ, li estis komisiita organizi komitaton por la religia instruado pere de te-levido. Parolante pri siaj agadoj, li diris, ke en Li-sieux li ricevis de la loka episkopo por siaj eksperi-

mentoj malnovan preĝejeton, unu el la 18.000 ne plu uzitaj en Francujo por religiaj celoj. Li instalas en la fono specialan ekranon, kiu permesas projekciojn sen mallumigi la fenestrojn. Dum la liturgiaj vortoj, bildoj ilustras la tekstojn, tiel ke la bildoj komentas la vortojn, kaj reciproke; kaj kantoj akompanas samtempe la diservon per diskoj, gvidante la asembleon. "En la pasinteco - diris la pastro - oni pentradis la murojn de preĝejoj; sed tiuj pentraĵoj estis neŝanĝeblaj; dum pere de diapozitivoj oni povas komenti la legaĵojn de ĉiu ajn festo". P. Pichard asertis, ke la eksperimentoj, kiujn oni jam faris multloke, altiris grandan intereson de la fideluloj, kiuj de la 15 procentoj de la loka loĝantaro, kiuj antaŭe frekventis la preĝejon, kreskis ĝis 80 procentoj. Sed, kiel dirite, lia plej grava entrepreno rilatas la televidajn transsendojn. Laŭ li ĉi tiu moderna komunikilo tiom eniĝis en la centron de nia vivo, ke oni ne povas disigi ĝin for de la religio. Ĝi devas fariĝi disvastigilo de la kredo. Li sukcesis organizi ĉe la franca televido ĉiudimanĉan religian programon. La unua parto temas pri taŭga filmo, kiu daŭras cirkaŭ kvardek minutojn. La dua parto prezentas aŭdvide la meson kun homilio; fine oni donas dum kelkminuta rubriko, informojn pri la eklezio. Same, kiel ĉiusemajne estas diversaj la preĝejoj, el kiuj oni transsendas la meson, tiel ankoraŭ diversaj estas la predikantoj. Por la regula disvolvo de tiu programo zorgas franca komitato por televido, asocio de li organizita. De kelkaj jaroj ankaŭ en la afrika Ruando estis starigita simila gvido-centro. Jam nun ne nur katolikoj uzas ĉi tiujn rimedojn, sed ankaŭ; kvankam laŭ pli-malpli granda proporcio, hebreoj, protestantoj, kaj ortodoksoj.

EN LA SINODO DE WÜRZBURG oni dediĉis tutan taĝon al la diskuto pri la penta sakramento. Estas kons^utatebla fakto ankaŭ en Germanujo, kiel ĝenerale ĉe multaj katolikaj medioj, ke oni emas forigi ĉi tiun sakramenton. La Sinodo do ne povis ignori ĉi tion, kaj alfrontis la novajn koncernajn demandojn: ĉu la penta sakramento povas esti anstataŭata per la komunuma pentesprimo komence de la meso? aŭ, alivorte, ĉu la pentaj preĝoj, kiuj enkondukas la meson, havas sakramentan efikon? Ĉu tiu publika pentesprimo povas sufiĉi por sociaj kulpoj, dum la ĉe-orela konfeso estas postulata nur por individuaj kulpoj? Ĉu ankaŭ aliaj komunumaj celebroy povas anstataŭi la konfesan sakramenton? Post multaj intervenoj kaj longaj debatoj, oni konstatis ke, kvankam klare estas, ke la penta sakramento estas necesa por sin purigi de ĉiu mortiga peko, laŭ la Tridenta doktrino, estu ankoraŭ necese profundigi esploradon por respondi al multaj demandoj pri ĝia anstataŭigo, ofteco, animpretigo al aliaj sakramentoj, ktp. Kaj oni decidis, ke oni ne agnosku definitivaj la rezoluciojn de la faritaj studoj, sed oni daŭrigu la priserĉadon.

GRAVA INSTRUKCIO de Paŭlo VI pri tio aperis la 14an de julio por la tuta eklezio. La dokumento, artikita laŭ 13 paragrafoj, nenian novigon donas kompare al la eklezia doktrino, difinita en la Tridenta Koncilio, kaj ne ŝanĝas la nunan disĉiplinon. Nur admonas, ke temis pri grava miskompreno kaj trouzo praktikaj ĝeneralajn aŭ kolektivajn absolvojn kiel ekz. en la komenco de la meso, anstataŭ sakramentajn absolvojn: la individua pekconfeso estas la unika ordinara rimedo, per kiu ĉiu fidelulo repaciĝas kun Dio kaj kun la eklezio. La instrukcio konfirmas kaj precizigas kelkajn konatajn kazojn, kiel en komuna mortdanĝero, aŭ

fizika neebleco de la konfeso, (sed ne okaze de amasa fidelularo, kiel ekz. en pilgrimadoj!) en kiu sacerdoto povas disdoni kolektive sakramentan absolvon. Sed eĉ tiuj, kiuj ĝuis tiun esceptan rimedon, revenante al normalaj cirkonstancoj devas denove konfesi siajn pekojn. Fine la instrukcio, invitante al ofta pekkonfeso (ne nur de gravaj pekoj!) severe admonas la sacerdotojn, ke neniŭ malpersvadu fidelulojn pri ĝia neceso.

MEMORE DE JOHANO XXIII estis inaŭgurata en Hispanujo je la 23a de majo, du metrojn altan monolito. La granita monumento ornamas la ĉefan placon de Sotosalvos, apud Segovio, kaj estis benata de mons. Palenzuela, episk. de Segovio. En la supra parto de la monolito estis enfiksita bronza basreliefo kun la bildo de Johano XXIII. En la soklo oni legas la evangelian frazon: "Estis homo sendita de Dio, kies nomo estis Johano".

ĴUS APERIS NEDERLANDA katekismo por lernantoj de la tri superaj religiaj klasoj. Post la bruo ekscitata de la unua nederlanda katekismo, kiurenkontis malaprobon de ĉiuj aliaj naciaj eklezioj kaj de la Sankta Sidejo mem, oni devas kun konsterno agnoski, ke ĉi tiu lasta, estas inverse progresa katekismo, ĉar ĝi estas multe pli detruema de la katolika sento ol la unua. Sufiĉas mencii, ke en ĉi tiu katekismo estas pridubata la dieco de Kristo! Lia pasiono, morto kaj reviviĝo laŭ ĝi estas verŝajne legendoj; pro tio, eklezio, papo doktrino, dogmoj, ktp. estis miskomprenoj de la evangelio... Oni devas konstati kun granda ĉagreno, ke tiu katekismo devojiĝis de la katolika kredo; eĉ protestantoj rifuzus ĝin. Jesuito Jean Galot kritikis tre severe ĝin en "Civiltà Cattolica".

LA PLENA ASEMBLEO de la pola episkoparo okazis en Czestochowa, ĉe la Sanktejo de la Nigra Madono, sub gvidado de kard. Stefano Wyszynski. En komunko disdonita post la kunsido oni diras interalie, ke la ekleziaj aŭtoritatoj "prijuĝas pozitiva" la deklaron de ĉefministro Piotr Jaroszewicz en Parlamento la 29an de la ĵuspasinta marto, en kiu li konfirmis la bonan dispozicion de la pola registaro pri la normaligo de rilatoj inter eklezio kaj ŝtato. Sed samtempe la pola episkoparo, kvankam aprecas la klopodojn de la aŭtoritatoj por doni solvon al problemoj de malabundo de loĝdomoj, opinias, ke la konstruo de preĝejoj devas esti pritraktata almenaŭ samgrade kun la kreo de publikutilaj konstruaĵoj, kaj konfidas, ke la ŝtataj aŭtoritatoj estos komprenemaj pri la necesoj de la pola eklezio. Samtempe la polaj episkopoj deklaras, ke ili klopodas ĉiamaniere krei taŭgan atmosferon, por atingi de la registaro la abolicion de tiuj limigoj, kiujn ĝi trudis al la eklezio post la 1956a jaro.

PLI OL MILIONO da pilgrimantoj vizitis la sanktejon dediĉitan al Maria en Fatima dum la jaro 1971a. En tiu sama jaro estis tie celebritaj 15.840 mesoj, preskaŭ mil nuptaj solenoj kaj 140 baptaj.

LA KATOLIKOJ EN INSULO MAŬRICIO, je 800 km. ^{ori}ente de Madagaskaro, en la hinda oceano, estas 270 mil inter la 800 mil loĝantoj; ili havas episkopon kaj 52 sacerdotojn indiĝenajn, 450 eksterlandajn kaj ĉirkaŭ 300 religiulinojn. La religi'aj misiistoj estas Lazaristoj, benediktanoj, la Patroj de la Sankta Spirito, kaj ĉefe jesuitoj. La religiulinoj estas la Franciskanaj Misiistinoj de Maria, kiuj laboras en la insulo ek de la 1963a. Multaj estas la katolikaj studocentroj por la junularo.

.....